

KARAJ gepatroj kaj infanoj aliĝintaj al IIK 2009!

Bonvolu

- konfirmi ricevon de tiu ĉi IIK-komuniko,
- legi la tutan tekston detale kaj eble reagi,
- printi ĉi tiun paĝon kun ĉiuj haveblaj informoj kaj kunporti al UK.

ALVENO: Infanoj kun siaj valizoj kaj gepatroj alvenu sabaton, la 25-an de julio en UK-kongresejo kaj kolektiĝu en tiel nomata "ripozejo" ĝis la 17-a horo. Gepatroj povas tiam paroli kun la diversaj gvidantoj. Ĉiuj IIK-anoj kune forveturos je la 18-a horo per lua buso, kiu atendas sur strato Miła proksime de la granda tendo.

REVENO: Ĉiuj infanoj revenos al UKejo sabaton, la 1-an de aŭgusto per lua buso, alvenos en la granda tendo je 10h30 ĝis 11h kaj lasos siajn valizojn en la fono de la tendo. Fine de la Solena Fermo, ili prezentos kanton kaj poemon "La haro" kiel teatraĵeto. Post la Himno kiel fino de Solena Fermo, gepatroj konfirmu al mi antaŭ repreni siajn infanojn. Informu se vi bezonas pli frue foriri.

PUBLIKA TRANSPORTO al IIK-ejo:

Piede aŭ per urba buso n-ro 3 (direkto Ogrodniczki) aŭ n-ro 16 (direkto Gajowa) veturu de haltejo "Wiejska/Politeknika" aŭ "Wiejska/zwierzyn" ĝis "Sienkiewicza" (Biuro Proj.-Urząd Pracy). Tie necesas atendi eksterurban buson "Linia Supraśl" (5,90 zlotoj) dum 20 ĝis 50 minutoj (<http://www.kzk.pl/index.php?show=3>). Post ĉ. 25-minuta veturado, eliru en urbeto Supraśl je haltejo "Piłsudskiego (park)", apud granda ortodoksa preĝejo. Post tiu preĝejo dekstren eniru la Edukan Centron kaj 4-etaĝan domon "Internat".

ALVENO PER AŬTO al IIK-ejo:

Veturu nord-okcidenten laŭ strato 676 tra Ogrodniczki, poste arbaro, ĝis Supraśl. Antaŭ ortodoksa turnu maldekstren, tuj poste dekstren enveturu la Edukan Centron ĝis "Internat".

IIK-EJA ADRESO: internat "Bukowisko", Gospodarstwo Pomocnicze, Centrum Edukacji w Supraślu, ul. Piłsudskiego 64, PL-16-030 Supraśl; gastejestro s-ino Muszyńska: 085-000.00.00

TELEFONA KONTAKTO nur se gravajo, provu unue SMS:

enlanda numero +48-000.000.000 de s-ino Alina Mozer, parolas Esperante kaj pole.

enlanda numero +48-000.000.000 de s-ino Lidia Nowak, parolas Esperante kaj pole.

enlanda numero +48-000.000.000 de s-ino Iza Walentynowicz, parolas pole kaj france.

eksterlanda numero +32-000-00.00.00 de s-ro Matthias Humet, parolas Esperante kaj nederlande.

MERKREDA EKSKURSO: La 29-an de julio, kiam UK tuttage ekskursas, IIK ekskursas al Augustów. Kelkaj gepatroj jam aliĝis. Por ili atendas lua buso je 8h30 sur parkejo en strato Miła antaŭ UK-tendo, ĝi foriros unue al IIK-ejo. Aliĝintoj kunportu piknikon, banvestaĵon. Reveno al UKejo ĉirkaŭ 19h.

INFANOJ NEPRE KUNPORTU TION:

- san- kaj vakcinad-kajeroj, san-asekura karto/formularo aŭ ties kopioj, kiujn la infano konservu.
- medikamentoj kun uzinstrukcio, se necesas. Tiukaze informu nin.
- kremo kontraŭ sunbruliĝo, ĉapo kaj okulvitroj kontraŭ forta sunlumo.
- sapo kaj dento+broso+pasto (la gastejo liveras littukojn kaj bantuketon)
- bankostumo, bantuko, eble bansandaloj por eniri akvon.
- dorsosaketo por porti piknikon, banveston, bantukon, akvobotelon dum ekskursoj.
- UK-kongreskarto, se vi ricevis, per ĝi prenu la kongresajn materialojn.

INFANOJ EBLE KUNPORTU TION:

- societaj tablo-ludoj, aliaj ludiloj, pilko, rakedo, volanludo ktp.

- tablotenisaj rakedo kaj pilko, tablo troviĝas en la IIK-ejo.
- ŝatata muziko sur KompaktDisko aŭ USB-memorilo por diskoteko.
- ĉio taŭga por ludoj, ĉar la junulgastejo mem disponas pri nenio
- bloveblaj ludiloj kiuj flosas sur akvo
- muzikinstrumentoj, notoj kaj kanttekstoj (probable ne estos piano)
- kraĵonoj kaj papero restaj el lerneja jaro por desegni kaj skribi.
- notu la nomon sur ĉiuj vestoj se la infano emas forgesi vestaĵojn.
- "Plantu Arbon"-t-ĉemizo el lastjara IIK
- fotilon (se elektronika fotilo, kunportu ghian USB-kablon)
- foto- aŭ film-prezento sur KompaktDisko au USB-memorilo, mi kunportos projekciilon kaj komputilon por montri sur muro, tiukaze informu min nun.

INFANOJ NE KUNPORTU TION:

- valoraj objektoj (perdo kaj ŝtelo ĉiam eblas, kvankam gvidantoj atentis)
- elektronikaj ludiloj (tiuj kreas ĵaluzon kaj malhelpas kuran aktivadon)
- littukoj (tiujn donos gastejo)

SANO:

- +- Kaze de akcidento au sanproblemo, ni konsultos kuraciston au hospitalon, kiu decidus pri necesa traktado. Per transdono de viaj infanoj al IIK, implicate vi konsentas pri tiu maniero kaj vi engaĝiĝas repagi eventualajn kostojn. Ni provos kontakti vin kaze de gravaĵo.
- +- La infano kunportas vakcin-kajeron aŭ ĝian kopion. Bonvolu informi, se via infano ne ricevis la bazajn vakcinojn (difterio, tetanoso, poliomjelito, tuberkulozo) kaj klarigi la kaŭzojn.
- +- La feriejo situas je 1 km de lago, ni do iros bani kaj naĝi plurfoje. Tiam la infanoj restos sub kontrolo de plenkreskuloj/instruistoj. Bv. informi, se via infano ne konas aŭ ne respektas la limojn de sia kapablo naĝi, plongi, subakviĝi. Bv. informi, se via infano ne rajtas naĝi.
- +- Informu viajn infanojn pri iksodoj, petu ilin averti gvidantojn kaze de haŭta inflamo. Ni havos specialan kroĉilon por turne eltiri iksodon. Legu www.otom.com. Post inflamo observu dum 3 semajnoj. Kaze de ia ruĝa inflama ringo konsultu kuraciston, kiu donos antibiotikon. Ekzistas vakcino kontraŭ iksodoj. Informoj en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Iksodo>

KIOM aliĝis ?

25 knabinoj de 6 ĝis 17 jaroj

12 knaboj de 7 ĝis 13 jaroj

11 plenkreskuloj de 22 ĝis 76 jaroj

14 loĝlandoj: Aŭstralio, Belgujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo/Katalunujo, Hungarujo, Japanujo, Kanado/Kebeke, Kazahujo, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Svedujo
Viud fotetojn de ĉiuj: <http://bertosch.free.fr/iik2009/alighintoj.html>

Ĝis baldaŭ un UK kaj IIK !

Estime salutas Bert SCHUMANN, IIK-gvidanto kaj UEA-komisiito pri IIK.

Cesson-Sévigné, Francujo, la 12an de julio 2009

PS: Mi ne plu estos hejme ekde la 17-a de julio ekde tiam ne atingebla.

Mi alvenos en IKejo jam vendredon, la 24-an de julio.